
# Aŭstraliaj  Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Bob Felby**

**PLENUMITA 28/07/2022 Kvincentnaŭdektria eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron


Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *esperanta retradio* *Plena Analiza Gramatiko* *Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 705,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas 299,000 lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas 163,000 lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas 145,000 lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas 98,000 lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

## Surhavu vizaĝmaskon. *Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**
**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondas pri via sano, do portu maskojn.

Aŭstralio ĵus komencis akcepti la ĉinan *yuan* anstataŭ US dolarojn por nomitaj karbaj kontraktoj al la Popola Respubliko de Ĉinujo. La monda mono sistemo ŝanĝas. *Roger S*



la [esperanta retradio]



Donas bonan ĉirkau-5 minutan auskultadon kaj legadon ĉiun tagon.

23a julio 2022

KIAL 37 GRADOJ ESTAS TRO ALTA TEMPERATURO

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



# Arto kaj Belmetio.

ARTO = LA HOMA MENSO TRANSFORMAS LA NATURON AL PERSONA STILO. (angle: *art*), BELMETIO = LA HOMAJ MANOJ ELEKTAS KAJ KREAS LA PLEJ BELAN MATERION. (angle: *craft*). (notu ke en la ĉi suba priskribeto temas nur pri pentraĵoj!).

Ĉiu artjuĝisto en la mondo havas sian propran formon de artjuĝado. Ankaŭ mi, juĝisto antaŭ multaj jaroj. Eble estas utile aŭ interese, legi miajn nunajn juĝojn de la arto en Aŭstralio. Unue ni devas klare distingi inter arto kaj belmetio (*craft*). La procedo por ambaŭ estas malsama. Intermiksiĝo, kaj tiel kreas sian specialan stilon. En tiu stilo oni devas klare distingi kaj en tia sistemo la artjuĝisto devas klare vidi kiom ĉeestas da ĉiu el la du, arto kaj belmetio. Kelkfoje ni trovas, ke ĉeestas nur belmetio, kaj ĝi tamen valoras havi en la vivo. Eĉ tion la nespecialistoj malĝuste nomas arto.

En mia juĝo mi nomas *Arthur Boyd* kaj aliajn membrojn de kaj ĉirkaŭ la t.n. *"Heidelberg Skolo"* grandaj kaj mezegaj artistoj. Krom havi sian belegan artoformon ili havas ankaŭ la helpan belmetion (*craft*) por fortigi la aperon de ilia arto. En ĉi tiu mia juĝo aplikiĝas komparo en internacia skalo, precipe ĉar malmultaj grandaj artistoj aperis en tiu tempo, kaj ĝis nun, en la mondo.

Sed en tiu epoko, kaj ĝis nun, du konataj artistoj aperis en Aŭstralio, kiujn la plejparto de la artjuĝistoj nomas grandaj, dum mi juĝas ilin nur iomete artismaj. Ili estas *Sidney Nolan* kaj *Brett Whiteley* En siaj verkoj ili aplikas multe da belmetio, "*craft*", per kio ili igas sian malriĉan arton aperi kiel granda. Ili faras tion intence, kaj sukcesas mistifiki la juĝistojn kaj la publikon. Iliaj pentraĵoj ricevas multe da mono pro tiu mistifikado. Danke al la malĝusta kono de la ĝeneralaj juĝistoj.

Alia artisto, sed nekonata, *Alida Leereveld*, ne posedas belmetion, sed la arto de ŝiaj abstraktaj pentraĵoj enhavas la karakteron ke kiam oni rigardas ilin ili montras moviĝon en la pentraĵo. Malmultaj artistoj kapablas tiel vivigi la abstraktaĵojn. Pro tio ŝia artopozicio en la mondo estas almenaŭ alte mezgrada. La financa valoro de tiaj ŝiaj pentraĵoj do estas pli ol de la pentraĵoj de *Nolan* kaj *Whitely*.

*Marcel Leereveld.*

## —Marcus Aurelius



La celo de la vivo estas ne esti ĉe la flanko de la plimulto, sed por eviti trovi sin en la vicoj de la frenezuloj. ─Marko Aŭrelio



**La Jarkunveno de EFNSK** okazos **sabaton la 10an de septembro je la 5-a posttagmeze**. Ĝi okazos **reale en Esperanto-domo** 143 Lawson Street, Redfern **kaj virtuale** per la programo Zoom.

La estraro demisios kaj la postenoj estos atribuitaj dum la jarkunveno.

Ĉiuj kandidatoj, inkluzive de tiuj, kiuj jam estas estraranoj, devas esti kandidatigataj kaj subtenataj. La kandidatoj devas ankaŭ konsenti, per retpoŝto, ke li aŭ ŝi akceptos la postenon. La sendanton de la unua kandidatigo oni konsideros kiel la proponanton, la duan kiel la subtenanton. Ambaŭ devas esti financaj membroj de EFNSK.

https://zoom.us/j/9177952650?pwd=Wkh5QU9rakhnUnF2WEVSWDI2ZnF6dz09
Kunveno ID: 917 795 2650 Kodo: 700274

Laŭ la nova statuto de la Federacio (legebla ĉe http://esperantohouse.org.au/eo/about-us/), se iu estis estrarano seninterrompe dum naŭ jaroj aŭ pli, speciala rezolucio devas okazi, por permesi lin aŭ ŝin esti kandidatigata (kaj elektota) dum pluaj periodoj. Tial, ni voĉdonos pri la jena rezolucio (en la angla) dum la jarkunveno:

• *That Nicole Else, Alan Turvey and Dmitry Lushnikov be permitted to be re-elected as directors.*

Membro povas esti kandidatigata por unu aŭ pli el la jenaj postenoj:
- prezidanto - vicprezidanto - ĝenerala estrarano

Sendu kandidatigojn rete al: **nsw@esperanto.org.au**
Aŭ poŝte al: EFNSK Esperanto House 143 Lawson St Redfern NSW 2016

Ni esperas, ke vi povos ĉeesti la jarkunvenon. Bonvolu sciigi nin, ĉu vi ja intencas ĉeesti aŭ ne kaj se jes, ĉu vi deziras ĉeesti persone aŭ virtuale. Ankaŭ bonvolu sciigi nin se vi deziras esti kandidatigata por la estraro aŭ povas iel helpi la Federacion. Se vi NE povos ĉeesti sed tamen ŝatus voĉdoni, vi povas peti iun voĉdoni nome de vi (kiel via mandatulo). Bonvolu kontakti nin se vi ŝatus pli da informoj.

Ni ankaŭ feliĉus aŭdi viajn komentojn, ideojn, ktp, por la venonta jaro.
Amike, Nicole Else Sekretario, EFNSK





Mia kuracisto donis al mi pliajn ses monatojn da vivo, sed ĉar mi ne povis pagi al li la fakturon, li bonvole donis al mi pliajn ses monatojn! *Bob Felby*

# La mondo dividas



Bluaj landoj subtenas sankciojn kontraŭ Rusujo

Verdaj landoj ne faras sankciojn kontraŭ Rusujo

## Rusujo bezonas Zelensky vivanta por subskribi pacinterkonsenton

Nato gajnus grandan propagandan eblecon se Zelensky estus mortigata kaj Rusujo povus esti kulpigita Gonzalo Lira: Zelensky Is About To Be Assassinated By The Americans? | The Vineyard of the Saker

Demandoj kaj kialoj pri la ukraina milito kaj estonteĉo de la monda divide.

Five months into the Special Military Operation – a summary | The Vineyard of the Saker usona

La novaĵoj en la reto estas duflankaj. Mi legas la Okcidentan kaj la Orientan, sed la niaj mondaj politikoj ŝanĝas. Baldaŭ ni scios kiu sistemo venkos. Do mi nur atendas por vidi kiuj venkos. Estas grava period en la historio de la mondo.

*Roger Springer*

**En Litovio** eblas vidi multe da cikonioj. La loĝantoj ofte fiksas radon sur altan foston por ke la birdoj tie bildu neston. Tiuj birdoj estas ŝatataj ĉar ili anoncas la belan veteron. Kompreneble ankaŭ la legendo tradicie rakontita al infanoj estas ke cikonioj alportas bebojn. Amuzas min rigardi kiel ili en kampo paŝas , moviĝante la la kapon antaŭen kaj malantaŭen . Tio memorigas min ankaŭ pri la tempo kiam mi en Alĝerio vivis. Bedaŭrinde mi baldaŭ adiaŭos Litovion.



*Franciska Toubale*

# "Ĉio rilatas al energio". Vidu AE592

Kara Roger, vi aperigas artikolon sub la titolo "Ĉio rilatas al energio". Certe trafa eldiro. Ankaŭ pravas la frazo "Ne ekzistas anstataŭaĵo por energio."
Sed ni devas konstati, ke niaj ĝisnunaj industriaj energiliverantoj, nafto, gaso, karbo, ĉiuj kolektis sian energion en aliaj periodoj de la vivo sur la tero. Ni nun komprenas, ke ilia daŭra grandskala uzo gvidis al trovarmigo de la tero. "Tro" ne por la tero, ĝi trans"vivos", sed por la homaro. Ni devas timi, ke la klimata krizo, se ne forte kaj rapide kontraŭbatalita, pereigos la homaron.

De kie nafto, gaso kaj karbo ricevis sian energion? Finfine de la sunlumo. Hodiaŭ ni devas kompreni, ke ni averaĝe ne rajtas uzi pli da energio ĉiutage ol la suno liveras ĉiutage. (Bone, ni konservu sunenergion por la malvarmaj vintraj tagoj. 😉) Atentu, ke ankaŭ la energio de akvofaloj aŭ de vento finfine estas la sekvo de la influo de la suno.

Se la mondo deziras aĉeti kemiaĵojn de BASF, tiam ni devas havi ekonomion, kiu ebligas al BASF forlasi la nunan energioliveranton gaso kaj anstataŭigi ĝin per daŭripova, "verda" energio. Se la homoj deziras vojaĝi, la trafikiloj devas uzi "verdan" energion. Se ni deziras daŭre uzi produktojn el metalo, la fandejoj, gisejoj devas produkti helpe de "verda" energio. Ktp.

Ni dum la pasintaj jardekoj vivis multe tro "malmultekoste". La prezoj de la varoj ne montris, kiom de la fakturo ni pagis per ne tuj konstatebla ŝarĝo de la monda klimato. Estonte la klimatsava parto de la kostoj, kiuj kombiniĝas al prezo, ludos rolon por la nombroj sur la prezoŝildoj en niaj vendejoj.

Antaŭvideble tiu videbleco de la klimatsavaj elspezoj - do pli altaj prezoj de ĉiuj varoj kaj servoj - kaŭzos grandajn sociajn maltrankvilojn.

Interesus min scii, kiel la sekvanta(j) generacio(j) solvos la taskon trankviligi la grandparton de la homaro, al kiu mankos la mono por vivteni sin, dum 1 % de la homaro posedas 50% de la monda riĉeco. Amike, *Peter Weide*



# Interesaj faktoj por Propagando

| *Lernado de fremda lingvo postulas* | **Komparu Esperanton** |
|---|---|
| *Lernu legi la skribitan lingvon. Ofte ĝi ne agordiĝas kun la parolata lingvo...* | ..Fonetike senescepta |
| *Lernu la gramatikon. Ofte ĝi estas plena da esceptoj al la reguloj..............* | ..17senesceptaj reguloj |
| *Lernu vortliston taŭgan por via espera uzo.........................................* | ..Kunmetitaj vortoj |
| *Lernu la standardan prononcon. Ofte ne agordas kun la parolata lingvo..* | ..Unu prononco |
| *Lernu la lokan parolatan lingvon.........................................................* | ..Ne ekzistas |
| *Lernu la ĉiutage mallongigitan parolatan lingvon...............................* | ..Ne ekzistas |
| *Lernu la idiomojn de la lingvo ...........................................................* | ..Ne ekzistas |
| *Lernu kiel kompreni la parolatajn respondojn al viaj demandoj............* | ..Unu monda lingvo |

## Esperanto ne havas tiujn malfacilaĵojn

La plej multaj Esperantistoj lernis Esperanton kiam ili estas plenkreskaj
Do ili estas tre toleremaj kaj helpemaj al lernantoj. *Roger Springer*




Ni festis la Esperanto-tagon Je dimanĉo pasinta (la 25a julio) la BES, post mallonga kunveno en la biblioteko ĉe la mezo de la urbo, piediris al la ĉiam-bela Ĝardenaro de Roma Strato. Tiu ĝardenaro estas tre amata de la loĝantaro de Brisbane pro ĝia proksimeco al la centro de la urbo kaj ĝiaj buntaj floroj kaj aliaj plantoj. Tie ni kune tagmanĝis. La vetero estis bonega, la bone konata vintra vetero de Brisbano, varma kaj sunoza. Post bongusta manĝaĵo ni vagis tra la ĝardenoj, admirante la belajn kaj diversajn specojn de plantoj kaj floroj kaj fine ĉiuj iris sian propran vojon hejmen





Ĉe Tablo

Kelkaj anoj antaŭ multkoloraj Brasikoj





Informis AE *Doug Eising*